

FINA VENKO?

Kelkaj pensoj, kiujn instigas la artikolo de Francisko en la pasint-septembra **Inter Ni**

La grandaj fiŝoj manĝas la etajn fiŝojn. Tio ankaŭ okazas pri lingvoj. Sed tio ne estas ĉiam malbona por la individuoj. Ĉi tie, je la orienta marbordo de Kanado, ni havas proksimume 8,000 Mikmakajn indiĝenajn parolantojn. 8,000 ne sufiĉas por krei literaturon, gazetojn, filmojn; por havi universitaton, sciencajn terminarojn kaj ĉion de la intelekta vivo. Se oni vivas en tiu eta kulturo, tia grupo riĉigos la mondon, sed paradokse tia individua intelekta vivo estas relative malriĉa. Pro tiu kaj aliaj kialoj, la anoj de etaj lingvoj foriras al riĉaj kulturoj kaj lingvoj. Inter la 6,000 aŭ 7,000 lingvoj en la nuna mondo estas nur centoj, kiuj havas sufiĉe riĉan kulturon por reteni membrojn. La aliaj miloj da lingvoj preskaŭ certe malaperos.

Kiam la mondo havos nur centon da grandaj, kulture riĉaj lingvoj, ĉu tio estos ekvilibra stato aŭ ĉu finfine nur unu granda fiŝo naĝos en la maro? Mi ne scias. En la historio, la punta lingvo estis tio de la plej potenca etna grupo. Nun, la ekonomia povo kaj la taŭga milita povo de Usono malfortiĝas. La usona jara deficitado de la buĝeto kaj la internacia komerca deficitado kunmetitaj estas pli ol 7%. La IMF (Internacia mona fonduso) ne daŭrigas monopruntan por pli etaj landoj kiam ili havas 5% deficiton. La inklino (relative) estas suben. En orienta Azio la mandarena lingvo kreskas, kaj en la mezo de Eŭropo la germana uzado kreskas. En partoj de Afriko, svahila lingvo estas punta lingvo. Intertempe, eble la mondo havos regionajn pontajn lingvojn.

Scienca fikcio iam iĝas scienca fakto, sed malofte. La estroj de Google opinias, ke ili konstruos universalan tradukilon – ĉefe per grandega komputila povo. Se tio okazos, eble la enorela tradukilo (kiel je “Star Trek”) sekvos. Alia sciencfikcia ideo estas „the Singularity” (ĉu “la unueciĝo” – red.). Tio estas la punkto kiam la komputiloj aŭ komutilaroj komencas lerni kaj krei memvole sen helpo aŭ interveno de homaro. Je tiu punkto, la plej altaj kaj fortaj vivoformoj sur la tero estos silicanoj, ne karbonanoj. Tiam ni parolos la lingvon, al kiu plaĉas niaj novaj mastroj: „01 0110 100”.

— Re-ni POR-TERO

HUMPHREY TONKIN FRAPAS KAJ RAVAS

Dum kelkaj pasintaj semajnoj mia fidela kaj ŝatata kunulo estis nova verko *Lingvo Kaj Popolo* de prof. Humphrey Tonkin kun la subtitolo "Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado". Eldonis ĝin 2006 Universala Esperanto-Asocio. La libro havas kartonan kovrilon, kiu bele aspektas, kaj 159 paĝojn (A5), prezo 14,10€. Tre praktike mi povas meti ĝin en la flankan poŝon de mia vintra surtuto. Tiu ĉi grava al mi publikaĵo konatigis min pri multaj kafejoj en mia hejmurbo Turku, Finnlando.

Temas origine pri la prelegaro por la Interlingvistikaj studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, Pollando. Ni ĉiuj, kiuj estas vicaj membroj en lokaj societoj kaj apartenas al la popolo menciita sur la kovrila paĝo de la verko, bezonas ĝuste tiajn faktojn kaj informojn prezentitajn de prof. Tonkin. Aferece kaj kompreneme la aŭtoro traktas esencajn detalojn, gravajn ankaŭ por ĉiuj unuopaj esperantistoj, kiuj emas pliprofundigi siajn sciojn pri la vivo kaj evoluo de la Zamenhofa lingvo. Leganto bezonas tempon por digesti ĉion. Materialo estas abunda. Multaj eroj, kiuj ne estas konataj al ordinaraj, strataj esperantistoj, surprizas supozeble iujn. La ĉapitro pri UN kaj Unesko donas argumentitan kaj klarigan vidpunkton koncerne la agadon kaj verajn rezultojn pro diversaj kampanjoj. Kaj por la veterana kaj la junulara generacioj la informoj ŝajnas utilaj. Laŭ Tonkin la vortoj „triumfo”, „miraklo” kaj „venko”, kiujn esperantlingva gazetaro kaj movadaj korifeoj uzis post la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Montevideo 1954 estas iom troigaj. Sobre la eksa prezidanto de UEA analizas koncernajn faktojn kaj ankaŭ postan evoluon kun kromaj atingajoj. Nepre ĉiu trankvile tralegu ĉi tiujn tiklajn punktojn.

Kiel veterano mi ĉiam fieras pro la tasko de vicrevizoro en la loka kluba vivo. Verŝajne oni facile kaptas la veran sencon de mia sinteno. Aliflanke ne mankas al mi diversaj aktivecoj en la movadaj kadroj. Tial apartan intereson mian vekis la sepa ĉapitro „La Esperanto-komunumo en la mondo”. Tonkin multflanke tuŝis engaĝiĝon de societa membraro al aktiva agado. Ĉio rapide ŝanĝiĝas, kompreneble tiel okazas ankaŭ en niaj tradiciaj rondoj. Trafe oni prezentas novajn trajtojn - ekzemple interretan medion - por novuloj kaj spertuloj sur la nacia nivelo. Eterna demando pri la nombro de esperantistoj ricevas lumigon el novaj, freŝaj vidpunktoj. Studado kaj ekzamenoj pri Esperanto en la hungara Eötvös Loránd - Universitato liveras atendatajn, tre paradoksajn rezultojn. Jam antaŭ jardeko Ferenc Jáki klarigis al mi en Budapeŝto, pri kio vere temas. Verŝajne tute alia estas la situacio nun en Poznano kaj en la tiea Universitato. Evidente ni ĉiam bezonas por parolaj ekzercoj allogajn klubejojn, en kiuj ni povas ĉe kafotaso nutri

nin per lingvaj spicaĵoj kaj novaĵoj el nia tutgloba Esperanto-vilaĝo.

Lingvo Kaj Popolo estas plenplena de legindaj kaj interesaj faktoj. Nur supraĵe mi sukcesis laŭ skrapo la enhavon de la libro – kvazaŭ nur etan surfacan parton de Esperanta oceano. Prof. Tonkin skribas erudicie kaj plaĉe. Same elegante li parolas. Tion mi konstatis sur la ondoj de Pola Radio dum elokvente plenumitaj intervjuoj. Li kribris konvenan legaĵon por movadanoj ĉie en la mondo. Lia prelegaro estas science redaktita kaj antaŭ ĉio pense riĉiga. Gestudentoj de Ilona Koutny en Poznano povas esti feliĉaj kaj fieraj, ke ili nun havas libroforme altkvalitan studmaterialon. Klubaj lingvoinstruistoj utiligu ĉi tiun okazon kaj elektu la verkon de Tonkin sub lupeon de legemaj gesamideanoj. Ni finnoj povus montri la vojon ĉi-rilate kaj mendi la libron (ISBN 92 9017 093 X) ĉe UEA en Rotterdam.

Fakulan, profundan recenzon skribis en **Libera Folio** mia samlandano el la Universitato de Helsinko, prof. Jouko Lindstedt, kies teksto tre taŭgas kiel enkonduka legaĵo por la prezentita verko.

Jaroj pasas. Permesu al mi fine mencii, ke mi interpretis por prof. Tonkin en la Universitato de Turku 1975, kiam li vizitis ankaŭ la Aŭtunajn Tagojn de nia landa asocio en Kuhmo ĉe la nord-orienta landlimo. Tiu eta, agrabla rememoro donis al mia komputila klavaro malpezajn flugilojn. La rezulton vi povas gustumi ĉi tie. Atentan librostudadon.

— Jorma Ahomäki

LA LEONO KAJ LA KOKINO

Leono kaj kokino renkontiĝas. La leono diras, „Se mi muĝas en la ĝangalo, la tuta ĝangalo timas min.” La kokino diras, „Tio estas nenio. Se mi nur tusas, la tuta planedo freneziĝas pro teruro.”

La 33a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO en SÈTE, FRANCI
okazos de la 18a ĝis la 25a de aŭgusto 2007.

**De preskaŭ 30 jaroj, ne pasigis somero sen la tradicia renkontiĝo je
Mediterranea Maro en Sète (Sud-Francio).**

**Nova teamo daŭrigas la laboron de s-ino Yvette VIERNE kaj bonvenigas vin
en granda parko je 50 m de plaĝo.**

**33a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO
2007-08-18 ĝis 2007-08-25**

Loko: SÈTE (Sud-Francio)

Instruistoj: S-ro JORGOS: kurso por komencantoj

S-ino Svetlana SMETANINA el Ruslando: paroliga kurso

S-ro Daniel MOIRAND: perfektiga kurso

Kondiĉoj: Aliĝo: 65 € ĝis 2007-05-01, 80 € poste

Senpage por junuloj malpli ol 26 jaraĝaj

krom 10€ de asocia kotizo

Intenseco: 4 horoj 30 tage: matene kaj finposttagmeze

Ekzameno: 1a grado kaj 2a grado de Franca Esperanto Instituto

Atesto pri ĉeesto

Aldonaj programoj: turisma, distra kaj kultura programoj (vidu la retejon)

Limdato: Sen limdato

Retejo: <http://perso.orange.fr/nikolao/esperanto.html>

Kontaktadreso: ESPERANTO KULTURO kaj PROGRESO

10, impasse école J.Ferry

FR-34290 SERVIAN

Tel+fakso: 33(0)4 67 39 16 30

Rete: jf.passarella@free.fr

Informoj: Eblas loĝi surloke (vidu la retejon)

(limdato 2007-7-14)

Ni deziras al vi kaj al via familio FELIĈAN NOVAN JARON 2007

— Jean-François Passarella, Louis Ensuque